

# NiaBulteno

OUTUBRO-DEZEMBRO 1996 OKTOBRO-DECEMBRO Numero 70

Informa Bulteno de  
Portugala Esperanto-Asocio

Boletim Informativo da  
Associação Portuguesa de Esperanto

☒ Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 LISBOA ☎ +351 +(0)1 +714 13 59

## Expolingua Portugal '96

Alcino ALVES



**Esperanto preskaŭ sola  
inter «lingvoj  
kaj kulturoj»**

pág.4

CURSOS  
96/97

PEA na WWW: <http://sweet.ua.pt/~jmm/esperant/index.htm>, pág.5

*Nia Bulteno* (informa bulteno de  
Portugala Esperanto-Asocio)

ISSN: 08719241

Numero 70 (okt.-dec. 1996)

**Direktoro:** Olga ALMEIDA

**Redaktoro:** António MARTINS

**kunlaboris:** Werther SACRA-

MENTO, Georgina PEREIRA

**reviziis:** Werther SACRAMENTO

**Eldonkvanto:** 500 ekzempleroj

Komputile kompostita

per *Aldus PageMaker*™ 5.0 kun

*Esp Svisujo*, *Esp Publika* kaj

*Esp Tempo* (el *Ĉapelo*™ 1.0j)

ofsetita per Risograph GR1700

en A.E.F.C.L.

Limdato por NB71: 1996.12.31

### Portugala Esperantio:

**Portugala Esperanto-Asocio**

✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A

PT-1500 LISBOA

☎ +351+(0)1+714 13 59

☎ +351+(0)1+793 39 24

✉ [bcacano@cc.fc.ul.pt](mailto:bcacano@cc.fc.ul.pt)

🌐 [http://sweet.ua.pt/~jmm/  
esperant/index.htm](http://sweet.ua.pt/~jmm/esperant/index.htm)

Fondita en 1972.04.25

Landasocio de U.E.A. ekde 1979

**K-ano A:** Faria de BASTOS

**Membraro** (96.11.09): 282 anoj

**Monata kotizo:** 240 PTE (<sup>2</sup>/<sub>3</sub>-a

rabato por emeritoj kaj sub-18-

-jaruloj, 100%-a por malriĉuloj)

**Aniĝkotizo:** 400 PTE (<sup>5</sup>/<sub>3</sub> de 240)

**Gvidorganoj (ekde 1995.03.25):**

**Ĝeneral-Asemblea Stabo:**

**Prezidanto:** Fernando COSTA

**Sekretarioj:**

Licínio GRANADA

Eusébio dos SANTOS

**Estraro:**

**Prezidanto:** Faria de BASTOS

**VicPrezidanto:**

António MARTINS

**Sekretario:** Alcino ALVES

**Kasisto:** Jaime CORREIA

## Ĉi-numere...

vi verŝajne konstatos ke revenis la dikaj numeroj de *NB*, post triopo (tuta jaro!) kiu, pro diversaj motivoj ne superis dudek paĝojn. Ĉi-numere revenas ankaŭ la portugallingva suplemento *Esperanto—Lingua viva!*, kies sukceso pli kaj pli grandigas. Vi konstatos ankaŭ ke la numero juliseptembra entute ne atingis vin. Mi tajpas nun tuj post kompletigo de ĉi oktobrdecembra *NB* mem, kaj ankoraŭ multo redaktendas en la suplemento... (Facilanimaj kritikistoj espereble neniam spertu la frustron fojan senti sin labori solaj — sen reeĥo kaj sen apogo.) La enhavo de ĉi numero inspiras la evidentajn alvokojn: pagu la kotizon, venu al la Zamenhoffesto, venu al la Renkontiĝo — kaj lernu, legu, abonu, musklaku, subskribu, postenu, vojaĝu, partoprenu, vivu esperanton! **via Red.**

### Voĉdonantoj:

Francisco MELO

Werther SACRAMENTO

Leal da SILVA

### Kontrol Komitato:

**Prezidanto:** Silva ALMEIDA

**Revizoroj:** Georgina PEREIRA

Franco SIMÕES

### Junulara Sekcio:

Portugala Esperanto-Junularo

*Jovens Esperantistas de Portugal*

✉ ☎ 📧 📠 ĉe P.E.A.

### PEJularo:

Susie CARVALHO,

Vitor MARQUES,

António MARTINS (Ancxjo),

José Luis MENDES,

João OLIVEIRA,

Georgina PEREIRA (Ĝina),

Ricardo TOSCANO k.m.a.

### Neelektitaj Postenoj:

**Instruado:** João SANTOS

**Libro-Servo:** A. da Silva ALMEIDA

**Biblioteko:** Werther SACRAMENTO

(periodaĵoj) vakas

(diversaĵoj) vakas

### Internet-aferoj:

José MARTINS (jmm@ua.pt)

**Libro-eldonoj:** Franco SIMÕES

*Nia Bulteno:* (vd. kolofonon)

*Esperanto—Lingua Viva:* (same)

**Gazetaro:** Alan ROMERO

**Eldondaĵoj:** Olga ALMEIDA

**Leteranimikoj:** Georgina PEREIRA

**Turismo:** Ana CASTRO

**Filatello:** Luis Filipe MARTINS

### Honoraj Membroj:

Manuel de Sousa TEIXEIRA

Alsácia Fontes MACHADO†

Manuel de FREITAS

Alberto Pedro da SILVA†

Herberto MIRANDA

### Landaj Reprezentantoj:

U.E.A.: A. da Silva ALMEIDA

ILEI: João SANTOS

E.E.U.: M. Faria de BASTOS

TEJO: António MARTINS

TEJA: Alan ROMERO

ILERA: Francisco MELO [Cf1CGE]

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Werther SACRAMENTO

IKUE: M. Salete dos SANTOS

KEK: Alcino ALVES

IFEF: vakas

SEL: vakas

ISAE: vakas

XVII-a R.P.E.:

# Barreiro'97

## XVII-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

### Barreiro, 1997.04.12-13

Post la ioma sukceso de Guimarães - Vizela (vd. pĝ. 6-8) en pasinta somero, la estraro entuziasmiĝis ree ĉiujare okazigi renkontiĝon. La urbo elektita por la do XVII-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj estas Barreiro, sur la kontraŭlisbona bordo de Taĵo. Barreiro estas historie tre grava urbo por la portugala Esperanto-movado, kaj ankaŭ hejmo de la solaj ZEOj ("Zamenhof"- aŭ "Esperanto"-objektoj) de Portugalio: la monumento al esperanto (vd. bild.) starigita sur plac-



Eduardo CRISPIM

eto Zamenhof. La decidita dato por la Renkontiĝo ankaŭ rilatas al tiu fakto: Fakte, ĝuste la 12-an de aprilo de 1987 estis inaŭgurita la monumento. La organizadon zorgas loka teamo (gvidata de la veterano Caeiro de SOUSA kun nepra apogo de nova / juna Jo-sé Luís MENDES). Helpemaj volontuloj, ĉefe el la municipoj de Barreiro, Moita kaj Montijo kontaktu ilin aŭ la sidejon. AM

### Renkontiĝoj de Portugalaj Esperantistoj

I	Coimbra	1973.12.16
II	Montemor-o-Novo	1974.05.12
III	Porto	1975.06.07
VI	Lisboa	1976.06.17-20
V	Caldas da Rainha	1977.06.25-26
VI	Coimbra	1978.06.17-18
VII	Porto	1979.06.15-17
VIII	Setúbal	1980.06.13-15
IX	Faro	1981.06.19-21
X	Caldas da Rainha	1982.05.28-30
XI	Santo Tirso	1983.06.10-12
XII	Lamego	1986.06.07-08
XIII	Castelo Branco	1989.06.10-11
XIV	Aveiro	1990.06.23-24
XV	Lisboa	1994.10.10-11
XVI	Guimarães - Vizela	1996.06.08-10
XVII	Barreiro	1997.04.12-13

## Zamenhoffesto '96

La venontan 15-an de decembro estos pasintaj 137 jaroj de la naskiĝo de iu bubo tiam nomata Lejzer, en urbeto Białystok. Li poste alprenis kelkajn aliajn nomojn, kaj en sia 56-jara vivaŭro umis kiel filantropa oftalmologo, filozofa, pledisto por la latinliterigo de sia jida lingvo, k.s. Li ankaŭ aŭtoris iun lingvo-projekton, kiu ankoraŭ nuntempe ha-

vas adeptojn. Cetere, klaĉoj asertas ke lisbona grupo da tiaj admiristoj organizos sabate je la 19:00 eĉ sidejan fiŝkaldronaĵan (t. n. bujabe-san) vespermanĝon omaĝe al li, al kiu aniĝeblas per la telefono (01) 714 13 59 (ajnhore) kaj kiu koston 1500\$00 al ĉiu partoprenonto... AM



D.R.

MOVADO:

## Expolingua Portugal'96: Esperanto preskaŭ sola!



Alcino ALVES

En 1996.10.24-26, jam por la kvara fojo, P.E.A. partoprenis en *Expolingua Portugal*, t.n. ekspozicio «pri lingvoj kaj kulturoj». Refoje en *Fórum Picoas* (Lisbono), post plurjara okazigo en *FIL*, la ĉi-jara evento ne portis konsiderindajn ŝanĝojn al la kutimo, nek ĝenerale, nek por la ĉeesto de nia asocio.

Sola novaĵo — tute maldetala estis ke ĉi-jare al P.E.A. estis proponita **senpaga spaco**, el kiu tamen pagendus 30 mil eskudojn por minimumaj elspezoj. Konsiderante ke en antaŭaj fojoj la budprezo ĉirkaŭis 200 aŭ 300 mil eskudoj (kiujn ni iel sukcesis pri-rabati kaj -subvencii...) tiu propono estis tuj akceptita de la estraro. Rimarku tamen ke

la propono aludis «spacon», ne «budon». Fakte, dum ĉiuj aliaj aspektis kiel normalaj, kutimaj, foirbudoj, tuta vico konsistis sole el starigitaj lignaj vandoj, sen lampoj nek frontono. Kompreneble, tio neniel ĝenis nian laboron kaj la budo de P.E.A. entute bonaspektis post aranĝo.

Videblis en ĝi diversaj esperantaj libroj sur la libro-serva rotacia montrilo, esperantaj periodaĵoj, televidilo kaj videilo (respektiva prunto de Jaime CORREIA kaj J. P. Rodrigues) kun la video-kurso *Mazi en Gondolando*, kasedilo kiu laŭtis la lastan *Vinilkosmo-kompil' 2* (vd. pĝ. 28), komputilo (prunto de António MARTINS) kun uzebla provversio de nia *WWW*-paĝo kaj la konkurso

«10 mil vortoj en 10 minutoj».

Deĵoris ĉiujn tri tagojn (10:00-19:00) António MARTINS kaj Franco SIMÕES, la matenojn ankaŭ «Ĝina» PEREIRA (◀), kaj la posttagmezojn vaĉe Zé Luís MENDES (◀), Vítor MARQUES, Susie CARVALHO kaj João OLIVEIRA; dume tre valoris la helpa deĵoro de Jaime CORREIA, Francisco MELO, Alcino ALVES (◀), Gonçalo NEVES kaj Faria de BASTOS.


Alla vizitantoj, kiu ĝenerale atentis speciale nian budon, estis disdonitaj kelkaj centoj de faldfolioj «*para comunicar sem obstáculos*», kaj aparte interesataj homoj ricevis ankaŭ «*o esperanto num relance*» kaj kompletojn de *Esperanto — Língua viva 0-8*.

Pravigante la jam malnovan kritikon ke da «lingvoj kaj kulturoj» malmulta vario estas, *Expolingua '96* plu prezentiĝis kiel komerca foiro de lingvo-lernejoj kaj eldonejoj, kiu okupiĝas preskaŭ ekskluzive pri la angla kaj la franca, dum pli kaj pli malmultas la ĉeesto de kulturaj reprezentantoj de aliaj lingvoj kaj popoloj. Krom ni kaj la galega registaro fakte nenio aparta troviĝis en la salono; ebla motivo por la intereso vekita ĉe la vizitintaro. AM

MOVADO:

## «<http://sweet.ua.pt/~jmm/esperant/>»: jen ni, Portugala Esperanto-Asocio

«Kio estas tiu hieroglifeca skribaĵo ĉe kiu laŭdire P.E.A. atingeblas?» Fakte, kvankam Esperantistoj umas en Internet jam pli ol jardeko, por plej multaj el ni tiu agado restis mistera kaj sensignifa. Ĝis nun: kun retpoŝto jam tri jarojn, P.E.A. disponas nun pri vere potencega informilo: WWW-paĝon!



Imagu dokumenton sur komputila ekrano. Tekston kaj bildojn. Dokumenton kiun vi atingis pere de telefonlineo aŭ de alia retkonekto al la granda tutgloba komputilreto *Internet*. Tio ja signifas ke tio kion vi legos neniam estos malaktuala; vi ne legas malnovan kopion de tiu dokumento sed ĉiam la plej lastan version, kiun ties aŭtoro disponigis en sia komputilo. Tio estas esence la bazo de la programo "*http*" (*hypertext transfer protocol*, hiperteksta transiga protokolo), unu el la ĉefaj iloj de nuna *internet*-uzado (alia estas ekzemple la retpoŝto — *e-mail*) kaj la bazo de la t.n. *World Wide Web*, la Tut-Tera Teksaĵo, kiun konsistigas milionoj da tiuj dokumentoj, tutmonde **interligitaj**.

Tiun interligon oni atingas pere de la specialaj ecoj de la t.n. hiperteksto, kiu ebligas "ligi" kelkajn ŝlosilvortojn (kutime indikitaj per substreko) al alia sekcio de la sama dokumento aŭ al alia dokumento. Se elinter la listo de Honoraj membroj de P.E.A. la nomo de **Alberto Pedro da SILVA** (vd.

pĝ. 20-21) estas substrekitaj, komputilanto povas ĝin musklaki kaj atingi alian dokumenton kun lia kompleta membiografio. Ĉar tiu alia dokumento povas esti ĉe alia komputilo de alia uzanto, kiu mem enhavas siavice ligojn al aliaj dokumentoj, k.t.p., la tuta reto iĝas "navigebla" informfonto!


Kvankam *Internet* aĝas jam delonge, nur antaŭ unu jaro ĝi fariĝis ĝenerale konata kaj uzebla. Disponigo de informo hiperteksto (t.n. "[hejm]paĝo") al interesiĝantoj estas do nuntempe tre interesa disvastigrimedo.

La "paĝoj" de P.E.A., lokigitaj kaj atingeblaj en la supra adreso de la Avejra Universitato — dank' al klopodo de José MARTINS, kaj kreataj de Ricardo TOSCANO kaj António MARTINS, enhavas informojn pri esperanto portugallingve kaj esperantlingvajn tekstojn pri Portugalio kaj la landa movado. Ligoj al interesaj lokoj de la reta Esperantio ankaŭ uzeblas. Tiuj paĝoj ekfunkciis meze de Novembro kaj plu kompletigadas. Reagoj kaj disvatigo necesegas! **AM**

XVI-a R.P.E.:

# Defio al la nuna stagnado de ĉia kulturo

□Werther  
SACRAMENTO



(Vizelaj verŝajnomia  
ponto kaj ekslibrisa statuo)

Sabate, la 8-an de junio, je la 9:05 horo, starto disde la lisbona stacidomo Sankta Apolono de la inter-regiona vagonaro veturonta al Oporto kaj enhavanta en kelkaj el siaj kupeaj vagonoj gajan diversaĝan esperantistan grupon, konsistigantan certe heroan avangardon de la portugala esperantista movado! Cele al norda konata urbeto Caldas de Vizela, kie supozeble la vorto "esperanto" estis trovinta neniam ian eĥon, ili tamen kaj spiteme ekvojaĝis por efektiviĝo de nova renkontiĝo kaj por obstine diskonigi sian lingvan taŭgan projekton.

Sed jam en la antaŭtago aliaj samideanoj estis vojaĝintaj tien aŭtomobile, por ebligi plenumon de la Renkontiĝa programo. Ili estis d-ro Faria de BASTOS kun pluraj gefamilianoj, ankaŭ nia kara António MARTINS kaj ankaŭ nia beletra stelulo

Gonçalo NEVES, kun sia juna edzino kaj filineto, ambaŭ ankaŭ samideanoj. Do ili ebligis tiel la efektivigon de la matenaj programeroj en la bela kaj bona kunvenejo lokanta centre de la urbeto kaj ĝentile disponigita de la loka komunumo. Intensiva esperanto-kurso estis gvidata de António MARTINS, Anĉjo, en apuda ĉambrego, kie samtempe estis vizitebla esperanto-lingva libr- kaj gazet-ekspozicio kaj kie ankaŭ aĉetebliis libroj kaj abonebliis gazetoj. Ĉio estis tre lerte kaj bele aranĝita, fare precipe de s-ano A. Martins, kiu

ofte estas la "ĉefingenerio" de tiaj aferoj...

Kiel anoncote, la IR-trajno kun sia geesperantista gaja ŝarĝo akurate alvenis al Vizela ĉirkaŭ la 16-a horo. La alvenantaro nombris iom pli ol 20 homoj: ja troa malfruiĝo de *Nia Bulteno* kaŭzis, ke multaj aliaj eventualaj interesigaĵoj ne povis sin prepari ĝustatempe por ekskurso daŭranta 2 tagojn... Malgraŭ pesimistigaj cirkonstancoj, ĉiuj facile trovis tranoktejojn, ĉu en pensionoj ĉu en malplikostaj restadejoj. Kaj vespere, en la belaj instalaĵoj de *Patronato*, situanta tuj post la loka preĝejo, s-ano António MARTINS, la vigla juna vic-prezidanto de PEA, aŭdigis sian akceptparoladon al la ĉeestantoj, kiuj atentokule sidadis laŭ du aŭ tri antaŭlokantaj benkvicoj de la kunvenejo. Inter ili elstaris la konata figuro de nia hispana samideano d-ro Alonso Núñez, prezidanto

de la Hispana Esperanto-Federacio kaj katedra profesoro pri Matematiko en Universitato de Santiago de Compostela, kiu tien venis akompanate de du kunlaborantinoj kaj invitite de PEA.

La esperantlingva prelego de Gonçalo NEVES sub la temo «Camões, de Camonius al Kamonio» montriĝis vere interesa kaj estis vigle aplaŭdita.

Je la 20-a horo, oni paŭzis por vespermanĝo. Poste, je la 22-a horo, okazis kultura spektaklo, kun deklamado el Camões kaj Pessoa. Ĉi-lastan partoprenis kaj ludis Gonçalo NEVES (deklamado de Pessoa), Franco SIMÕES (mimado de Pessoa) kaj Faria de BASTOS (deklamado de Pessoa). Pro la majstra ludado ili ricevis fortan aplaŭdon de la publiko. (Parenteze aldonendas ke prof. Alonso NÚÑEZ poste invitis ambaŭ rolintojn al vizito al lia Santiago de Compostela, por ripeto de tiu spektaklo antaŭ niaj hispanaj samideanoj, ja efektiviĝinta sukcese, okaze de la 500-a jariĝo de Universitato de Santiago de Compostela, la 4-an de julio).

Finiĝis tiu unua tago de la Renkontiĝo per piana ludado de pluraj muzikaĵoj fare de Flávia BASTOS, nevino de nia prezidanto, vekantaj grandan plezuron ĉe la aŭskultantoj, kiuj tondre kaj ripete aplaŭdis. Ja tiu knabineto montris grandan muzikan talenton! Tiu parto estis sekvita de prezentiĝo de J. P. Rodrigues, juna nova samideano, kiu tre lerte kantis kaj esperante kaj portugale plurajn kanzonojn modernstilajn, kiuj finiĝis per la triopa kantado fare de li, Rikardo kaj Anêjo, de populara kanzono *Ho branço, ho branço bela* en premiera esperanta versio (traduko de Anêjo), kio al ĉiuj vere plezurigis. Ludo de pluraj skeĉoj fare de tre talentaj gefamilianoj Bastos (Joana, Flávia, Tiago kaj Gustavo, aldone de la 5-jara Sara NEVES), kie Tiago pli kaj pli montriĝas tre kapabla,

metis finan punkton al tiu rememorinda sabato en la salonego de la bela urbeto Vizela — cetere plurfoje interrompita de elektro-ĉesoj, dum kiuj “blinde” (kaj majstrege) pianis Franco SIMÕES kaj kiujn fine “venkis” la faklerton de Alcino ALVES kaj de kapitano António ALMEIDA.

Dimanĉe matene, revene al la kunvenejo, okazis kolokvo pri «Strategio pri Esperanto en Eŭropa Unio». Tre tikla temo, ja. Ververe, la estonto de nia movado ĉi-momente multe dependas de la lingva politiko de Eŭropa Unio. Kaj opinioj kaj solvpropoj tre varias. Ĉio mikse kun pluraj kaŝaj kaj malkaŝaj interesoj kaj interesuloj, ĉe kiuj la ekonomiaj problemoj ankaŭ ludas gravan rolon. Sed laŭ opinio de kelkaj el la partoprenintoj en tiu kolokvo, la reganta rolo de la angla lingvo, kiu kvankam oficiala samrajte kiel la ceteraj, fakte estas la plej ĝenerale uzata de ĉiuj eŭropaj gravuloj, vekas fortan maltrankvilon flanke de tiuj, kiuj batalas por la adopto de lingvo vere neŭtrala por internacia uzado. Faria de BASTOS, António MARTINS, Alonso NÚÑEZ, kaj ankaŭ du el la lokaj ĉeestantoj, kleraj homoj, konigis siajn opiniojn pri tiu grava problemo, kiu ankoraŭ nun tre malproksimas de taŭga solvo.

Post tagmanĝo, invitite de la komunuma estraro, la renkontiĝaj esperantistoj ĝuis tre agrablan aŭtobusan ekskurson al la najbara histoririĉa urbo Guimarães, lulilo aŭ naskurbo de nia nacio. La vetero helpis, la suno brilis en blua ĉielo, kaj gvidate de kompetentaj ĉiĉeronoj, kiaj d-ro Faria de BASTOS, naskiĝinta en tiu regiono (kvankam en la rivala Vizela!), ni ĉiuj piede trapromenadis la malnovajn kvartalojn, vizitis la famegan kastelon, poste denove aŭtobuse veturis ĝis la konata monto *Penha*, kiun ni surgrimpis per telfero ĝis la supro, kiun ĉiuj

detaleme vizitadis, rigardis la turismaĵojn kaj ĉefe admiris la belegan vastan pejzaĝon de tie ĝueblan.

Reveninte al Vizela kaj post la vespermanĝo, ĉiuj reiris al la kunveneja salono, kie kun kutima raviĝo ni povis aŭskulti la fado-sesion en esperanto kaj en la portugala, kiam la grupo Fera Pordo, konsistanta el tri gitaristoj (du ludantaj per t.n. portugala gitaro kaj unu per "internacia" gitaro) kaj kvar kantistoj — inklude de Faria de BASTOS), ludis kaj kantis plej belajn fadojn.

Lunde, la 10-an de junio, "tagon de Portugalio", en la kunvenejo, la Renkontiĝo alproksimiĝis al sia fino kun prelego en portugala lingvo titolita «Lingva portugaleco — esperanto kiel instrumento: Kultura suvereneco kaj rajto je la lingvo», de Faria de BASTOS. Tre interesa klera prelego, kiu bedaŭrinde ne havis tiom da aŭskultantoj, kiom ĝi meritis. Pro sia graveco la teksto indas publikigon en *Nia Bulteno*. Sekvis gazetara konferenco, kiu rezultigis la publikigon de kelkaj artikoloj pri esperanto en la regionaj gazetoj.

Menciindas, ke sabate, la 8-an de junio, nia kara prezidanto Faria de BASTOS estis intervjuvita ĉe Radio Vizela, de la 11-a ĝis la 12-a horo kaj duono (tuttempe) en la programo *Grande Auditório*. La demandoj fokusigis la lingvon Esperanto, ties movadon kaj la lingvan problemon de Eŭropa Unio.

Kaj post la adiaŭaj vortoj de nia Prezidanto, la plimulto direktis sin al loka fama restoracio, kie oni povis gustumi multajn regionajn frandaĵojn.

Fine, la reveno. Unuj, aŭtomobile. La plimulto, vagonare. En ĉiuj, la koroj batis pli forte, ĉar plia guto estis falinta en la esperantan kampon kaj ni scias ke... guton post guto, konstante frapante, la akvo traboras la monton granitan! □

## 81-a UNIVERSALA KONGRESO: *Fondiĝis du novaj fakasocioj*

### Sociallaboristoj

En la UK en Prago fondiĝis nova esperanta fakasocio "Asocio de Sociallaborantoj Esperantistaj", kiu celas interŝanĝi spertojn inter sociallaborantoj en diversaj landoj, konatigi socian laboron inter esperantistoj, disvastigi la internacian lingvon inter sociallaborantoj, kaj ellabori fakan vortaron. La fondkunvenon partoprenis preskaŭ 20 personoj. Oni elektis estraron de ses personoj, kiuj funkcios dum trijara periodo tiel, ke du estraranoj estas elektitaj ĉiujare, laŭeble dum la UK. Prezidanto: Soile LINGMAN, Svedio; Vicprezidanto: Ursula KOLSCH, Germanio; Sekretario: Ingebjorg RAMBJOR, Norvegio; Kasisto: Birgit BRENANDER, Svedio; Membroj: Irmeli TANSKANEN, Suomio; Gunilla ALMER, Svedio. En 1997 la jarkunveno verŝajne okazos pentekoste en Stuttgart, en la kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Informas: Soile LINGMAN, ✉ Vasterasgatan 4, SE-11343 STOCKHOLM.

### Saŭnamikoj

AMIKOJ DE SAŬNO, la plej nova faka asocio en la movado, kies fondon proponis s-ro LEE Chong-Yeong dum la UK en Tampere (vd. *Jarlibron 1996* p. 68) serĉas hejmlokon kaj aktivajn geanojn. Anoncu vin al Pentti MAKKONEN, ✉ Ansapolku 1, FI-40630 JYVÄSKYLÄ, aŭ rete al Matti LAHTINEN, ✉ [matlah@jiop.fi](mailto:matlah@jiop.fi). □



81-a UNIVERSALA KONGRESO:

## Historian kongreson en Prago

□Faria de BASTOS

Prago gastigis ĉi-jare la 81-an Universalan Kongreson de UEA. La Universala Kongreso estis jam planita por 1992 en Prago, sed problemoj fontantaj el la nestabila ekonomio de Ĉeĥio malebligis finfine ties tiaman okazigon (Vieno anstataŭis Pragon kiel gastiganta urbo).

Aliĝis al la Kongreso 2971 homoj el 66 landoj (laste, la kameruno Victor NTO-NTO, forkaptita de fremdaj soldatoj dumvoje al UK).

La solena inaŭguro okazis antaŭtagmeze, dimanĉe, la 21-an. Gastis la solenaĵon ses ambasadoroj kaj ankaŭ membroj de la Honora Komitato. Inter aliaj eminentuloj, sendis al la Kongreso salutajn mesaĝojn Vaclav Havel, ĉeĥa prezidento, BOUTROS Boutros-Ghali, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Federico Mayor, ĝenerala direktoro de UNESCO, kaj kardinalo Miloslav VEK, ĉefepiskopo de Prago.

La reprezentantoj de la diversaj landoj laŭ ĉi-ties alfabeto vico salutis sur la scenejo la Kongreson kaj la kongresanojn nome de siaj landoj kaj asocioj. La PEA-prezidanto tie kaj tiam reprezentis Portugalion kaj PEA-n. La komitatajn kunsidojn ankaŭ partoprenis PEA-prezidanto.

La Nobel-premiito Prof. Reinhard SELTEN, iama vicprezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, prelegis pri la Ludteorio kadre de la Internacia Kongresa Universitato. Same li aŭtografis la libron (sian kaj de Prof. Jonathan POOL), *Enkonduko en la Teorion de Lingvaj Vetoj. Ĉu mi lernu Esperanton?*, kiu aplikas la faman Ludteorion al Esperanto.

La tritaga "Nitobe-simpozio" de internaciaj organizaĵoj pri lingvo por la internaciaj paco kaj demokratio estis organizita de UEA paralele al la U.K. En ĝi partoprenis reprezentantoj de UN, UNESKO, Eŭropa parlamento, internaciaj neregistaraj organizaĵoj kaj de UEA. La nomo Nitobe estis elektita omaĝe al la fama japana diplomato kiu kiel ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, raportante pri lingvaj problemoj en komunikado kaj pri Esperanto, nomis ĝin en 1921 «la motoro de internacia demokratio».

La Internacia Infana Kongreseto, konsistinta el 44 infanoj el 22 landoj, okazis en Rabyně na Slapy gvidate de prof. Christopher FETTES. La infanoj muzikis kaj kantis en kongreseja halo meze de la Kongreso kaj dum la solena malfermo. Tiago, la sola portugala reprezentanto, datrevenis kaj, akompanate de multlandaj amikoj, blovis la 11 kamdelojn en la kuko ekhavita por la datrevena festeto en la kongresejo mem.

El la Kongreso eliris la "Manifesto de Prago", kiu eldiras kiel «esencaj por efika kaj justa ordo» la principojn de demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.

Dimanĉe, revene el la Kongreso, en la flughaveno en Prago, la bubo Tiago esprimis dezirojn esti enkondukita unuafoje al la Nobel-premiito prof. Reinhard SELTEN kaj alifoj al la UEA-prezidanto prof. LEE Chong Teong, kaj ambaŭ deziroj plenumiĝis. Eble mejloŝtono en la vivo de estonta plenkreska esperantisto! □

MOVADO:

## Ĉu tro facila cedo?

En la n-ro 083 de *Eventoj*, 1995.08.01, mi legis artikolon "Fiaskoj kaj renaskiĝo en Bulgario", de la prezidanto de B.E.A.

En tiu artikolo prof. d-ro Kiril Popov sciigas pri kelkaj Esperanto-aferoj, kiuj fiaskis. Mi komentario nur pri «la mondfama Esperanto-kursejo en Pisanica ne funkcias». Tiu Esperanto-kursejo estis tiel fama, ke en nia lando Hispanio plurajn fojojn mi aŭdis pri ĝi. Do, mi decidis ĝin viziti dum antaŭvidita vojaĝo al Bulgario. Estus preferinde, ke mi ne estus irinta tien. Mi estis konsternita, rigardante la staton, en kiu troviĝis la forlasitaj aŭtobusoj, kiuj iam alportis al Pisanica entuziasmajn homojn, amantojn de Esperanto. Ili rustas kaj putras ekstere sen iu ajn ŝirmilo.

De antaŭ longe finiĝis la Esperanto-kursoj, kaj nun ĝi funkcias kiel malbonkvalita hotelo, de kiam la urbestro de Smoljan alproprigis la Esperanto-kursejon. Nek ekstere, nek interne iu ajn zorgas kaj ĉio iom post iom difektiĝas. En montaro kaj en tre bela loko la statuo de Zamenhof, kiu troviĝas en la korto de la Esperanto-kursejo, kaj la verda kvinpinta Esperanto-stelo sur la tegmento de la konstruaĵo estas la mutaj atestantoj de pli bona pasinta tempo por Esperanto.

Ankaŭ mi estis informita pri simila afero apud Sofio. En montaro Vitoŝa ekzistas monto-domo «Esperanto», kiu estis forprenita de BEA far la urbestro.

Multaj bulgaraj esperantistoj plendas pri tiuj maljustaj decidoj, sed, laŭmia opinio, ili tro facile submetiĝas al decidoj de urbaj respondeculoj. Nun, oficiale, totalismo malaperis, kaj ĉiuj homoj rajtas sufiĉe libere sin esprimi. **Martin BUSTÍN Benito, ES**

## 10-a KEK-Konferenco en Lisbono

De la 27-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro okazis la unuan fojon en Portugalio Konferenco de la Kolektivo Esperantista Komunista, internaciista kunveno kiu okazas ĉiujare. Pasintan jaron ĝi okazis en Sankt-Peterburgo (Rusio). Ĉi-jare, invite de portugalaj KEK-anoj, ĝi okazis en nia lando, en Lisbono. La kunveno estis pruntita de Sindikato de Centrlandaj Fervojoj kaj situas en salono interne de la stacidomo Rossio. Okazis vizito al portugala komunistpartia laborcentro Vitória, kie la konferencanoj estis kamaradece akceptitaj. Dum la tutsemajna kunveno, du tagoj estis uzataj por ioma distrado, nome vizito al la malnovaj kvartaloj de Lisbono kaj vizito al urbeto Sintra. **WS**

## Aalen & Stuttgart '97 Eŭropa Esperanta Kultura Semajno

1997.05.10-1997.05.13, Esperanta Kultura Festivalo en Aalen; 1997.05.13-1997.05.16, Eŭropa Junulara Parlamento en Stuttgart; 1997.05.16-1997.05.19, Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart

En 1997 okazos tri gravaj kaj grandaj aranĝoj, kiuj estas forte interplektitaj. Ili kombinas du celojn: prezenti interesan kaj distran programon al Esperantistoj kaj plialtigi la publikan reputacion de Esperanto kaj plikonatigi la lingvon kaj ĝian kulturon. Certe estos plej interese partopreni ĉiujn tri aranĝojn, sed kompreneble vi povas ĉeesti kelkajn el ili.

✉ Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstraße 21, D-70499 STUTTGART  
☎ 0049 711 860 15 20. □

MOVADO:

## Pri la kostoj de radikaleco...

«Komuniko de “Esperanto” Radikala Asocio:

[...] La Europa Komisiono aprobis la studoprojekton pri «Kostoj de (ne)komunikado en Eŭropo», prezentita de “Esperanto” Radikala Asocio. La projekto, sub la aŭspicio de la '94-nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard SELTEN, estos financata 55%-e, kaj ebligos informi pri esperanto la plej vastan nombron iam ajn atingitan da politikistoj, entreprenistoj, instruistoj: 100 000 personojn! (Ni memoru ke la Eo-movado komenciĝis per multekosta dissendado, fare de Zamenhof, de 10 000 ekzempleroj de la Unua Libro). Tamen tiu ĉi projekto plenumiĝos nur se oni trovos antaŭ la jarfino la restantajn 60 mil USD kiujn la Eŭropa Komisiono ne pagas. Se tiu ne okazos, ERA (kaj la movado) devos forlasi la projekton. Tial ni alvokas ĉiujn esperantistojn kaj E-organizaĵojn en la mondo: Unuigu viajn fortojn al niaj, tre malgrandaj... kontakto nin, kunlaboru, financu tiun iniciaton!

Kontribuoj al nia UEA-konto **erad-p** aŭ per sendo de kompleta kreditkarta numeraro, indikante la sumon kaj valuton elverŝitan, al ☎ 0039 66 880 53 96 ✉ Via Torre Argentina 76, I-00186 ROMA RM, Italio ☐ <E.R.A.@agora.stm.it>.

Per la samaj adresoj vi povas demandi al ni pliajn informojn pri la Projekto, pri niaj agadoj kaj de la Radikala Partio.» **Giorgio PAGANO (ERA)**

«Komuniko de Universala Esperanto-Asocio:

Lastatempe “Esperanto” Radikala Asocio (ERA), per diversaj komunikoj, petas financon subtenon de esperantistoj por projekto titolita «Kostoj de (ne)komunikado en Eŭropo».

Ĉe la 81-a U.K. en Prago, ERA petis aŭspicion de U.E.A. por tiu projekto. Post diskuto, la estraro de U.E.A. malakceptis tiun peton, pro jenaj konsideroj:

- ni dubas, ĉu ERA donas taŭgan kadron por produkti internacie aprobindan raporton;
- ni kun bedaŭro devas konstati, ke la antaŭaj agadoj de ERA, okazante sen adekvata konsultiĝo kun U.E.A. kaj niaj kunlaborantaj instancoj kaj ofte haste preparitaj, ne malofte efikis negative en la koncernaj medioj;
- multaj esperantistoj en Italio kaj alilande raportis malbonajn spertojn en siaj provoj kunlabori kun ERA tra la lastaj jaroj.

Per tio U.E.A. ne volas nei la agemon kaj certagradan sukceson de ERA, kiam temas pri subvencipetoj kaj similaj agadoj ĉe politikaj kaj edukaj instancoj.

Tamen ni substrekas, ke por longdaŭra agado sur firma bazo necesas pli da vera konsultado kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj de la Esperanto-movado, kaj pli da publikeco pri la financaj kaj aliaj rezultoj de la projektoj.» **Osmo BULLER (U.E.A.)**

---

Pro la lastatempa rezigno de ERA pri FUNDAPAX, necesas ke iu zorgu pri la adresaro de interesataj lernejoj, klasoj kaj instruistoj (entute 76 adresoj de 29 landoj), kompilitan de Bern WHEEL, kaj renomitan FUNDAPAX 2. Aldonoj, korektoj kaj informpetoj de Kent JONES, Komisiito pri Klerigo, ELNA, ✉ 5048 N. Marine D6, Chicago, IL 60640, Usono ☎ 001 312 271 86 73 ☎ 001 312 561 65 82 ☐ <102252.3271@compuserve.com>. ☐

---

## Inquérito aos sócios

Apesar de uma grande adesão inicial, poucos têm sido os inquéritos recebidos nas últimas semanas. Apelamos a todos os sócios que ainda não o fizeram para enviarem o seu inquérito o mais brevemente possível. O envelope sem franquia enviado junto com o inquérito só é válido até ao fim de Dezembro! Os resumos estatísticos da totalidade de respostas recebidas serão publicados no *Nia Bulteno* assim que estejam processados e permitir-nos-ão conhecer melhor o perfil da Associação e planear sobre ele o nosso trabalho na divulgação, ensino e aplicação da Língua Internacional. AM

MOVADO:

## Oficiale en Irano!

Aktivuloj de IrEJO (Irana Esperantista Junulara Organizo) sukcesis registri la oficialan esperanto-instituton "Sabz Andishan" ĉe la registraj instancoj. Tiu havas juran personecon, kaj povas tegmenti IrEJO-n kaj IrEA-n (Iranan E-Asociion). Laŭ la irana leĝo ne akcepteblas fremdaj nomoj por registritaj asocioj — tial la nomo "Sabz Andishan", kiu signifas perse "verdpensularo". Tiu ĉi oficialigo pruvis, ke malgraŭ deĵardekaj misasertoj tamen eblas asocia aktivado en Irano, kaj la situacio dependas de la esperantistoj mem. Planatas diversaj projektoj (regionaj filioj, profesiulo en la instituto k.t.p.) kaj necesas konsiloj, sugestoj kaj konkreta kunlaboro. Kontakti M. Reza TORABI, ĝeneralan direktoron ✉ P.O. Kesto 17765-184, Tehran, ☎ 0098 21 662 69 13, 📠 0098 21 605 40 90, ✉ karimi@eco.atu.ac.ir. el *Eventoj*

JUNULARA MOVADO:

## PEJ iĝas L.S.!

Post longe prokrastita decido, Portugala Esperanto-Junularo iĝis finfine Landa Sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) por Portugalio. Tiu decidon (punkton 17) aprobis la Komitato de TEJO dum la I.J.K. (Internacia Junulara Kongreso) okazinta lastsomere (en 1996.07.29-08.05) en Güntersberge, DE, (kiun bedaŭrinde ĉeestis neniu PEJ-ano). Iĝinte L.S. de TEJO, PEJ rajtas rekte influi kaj kundecidi la ĝian politikon kaj agado, per la voĉo de sia reprezenta komitatano (A), posteno kiu nun okupas Rikardo (vd. sube); la komitaton ankaŭ membras B- (rekte elektitaj de la individua membraro de TEJO; Ancxjo estastio) kaj C-komitatanoj (nomumitaj de la aliaj komitatanoj). La nunaj membroj de PEJ iĝas tiel aligitaj membroj de TEJO, sed ja plej multajn avantaĝojn ĝuas la individuaj membroj — nome ricevado de *Kontakto!* Nune L.S., jen plia motivo por ni-ĉies PEJ-laboro! Ancxjo

## Rikardo gemanien!

Konata aktivulo de P.E.A. kaj PEJ, entuziasmega esperantisto kaj neŝanĝebla junulo, Ricardo TOSCANO, decidis pasigi sian 23-an vivjaron en "Geĥmanio", kiel *Erasmus*-studento medicina en la Universitato de Stuttgart. La forveturo okazis la 17-an de oktobro kaj reveno estos somere. Li lasas vakaj la postenojn PEJ-sekretarion (kiun okupas nun Zé Luís MENDES) kaj periodajan bibliotekiston (pri kiu vi povas legi en pĝ. 23) kaj plu aktivis por la portugala movado kiel A-komitatano de PEJ ĉe la Komitato de TEJO.

Rikardo, kara amiko, ni deziras stultegan sukceson al vi eksterlande! PEJ

## AtlantPlon'96

Jam la kvaran fojon Portugala Esperanto-Junularo invitas al komuna amuziĝo dum la t.n. San-Martena Somero. Ĉi-jare la Atlantika Plongado okazos la semajnfinojn 11.30-12.01 de novembro, tuj post la junulara intensiva dusemajna kurso kiun organizas PEJ. La renkontiĝo okazos ne en Troia, kiel en antaŭaj jaroj sed en Vimeiro, ĉe Vítor MARQUES, kun pli bonaj kondiĉoj. Interesatoj anonciĝu tuj!

**Ancxjo**



## BEJO datrevenas

BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) havas novan estraron ekde sia julia kongreso en Ribeirão Preto. Ĝin gvidas kiel prezidanto Daniel Oliveira SANTOS, UEA-JD en Campinas. **Novaj kontaktoj** ✉ Caixa Postal 1097, BR-13031-210 CAMPINAS SP, [✉ <dosantos@correionet.com.br>](mailto:cdosantos@correionet.com.br).

BEJO festosian 30-jariĝon venontjare, dum kongreso kiu okazos en Curitiba, (ŝtato Paraná), samtempe kun la 33-a Brazila Kongreso de Esperanto. □

## HURAi landlime

Dum la MEJK'94 (Mez-Eŭropa Junulara Konferenco) en Trebič, ekestis la ideo inter hungaroj kaj aŭstroj, okazigi komunajn unutagajn renkontiĝojn proksime al la landlimo kaj antaŭ inviti speciale junaj slovakojn. Nomo estis baldaŭ trovita por la aranĝo: HURA! Unue estas Esperanta vorto, kiu esprimas ĝojon kaj due kompreneble estas mallongigo, kiun la E-ista animo ja tiom ŝatas, nome por Hungara Unutaga Renkontiĝo kun Aŭstroj. La unua HURA do planiĝis por februaro. Preparlaboro apenaŭ ekzistas. Per retroŝto mi interkonsentiĝis kun Lariko pri dato kaj loko, el trajnhoraro mi fosis taŭgan konekton kaj per komputilo mi produktis informon, kiu sendiĝis al interesitoj. Jen ĉio. Hungaroj faris samon siaflanke.

Kial ni entute volas fari tion? Ekzistas diversaj kialoj. Estas bonega maniero doni eblecon al novuloj, kiuj antaŭ nelonge lernis la lingvon, dum unu tago sen grandaj elspezoj ekzerci ĝin kaj ekkoni unuajn

E-ajn amikojn. Por aliaj estas ebleco renkonti malnovajn amikojn kaj dum unu tago bone amuziĝi en Esperanta medio. Krome tiaj renkontiĝoj sen tranoktado ne postulas organizadon kaj enkasigon de mono ktp.

La unua HURA gvidis nin al la hungara urbo Győr, la dua al la Slovaka urbo Bratislava kaj la tria denove Hungario, al Mosonmagyaróvár. Ĉiam partoprenis inter 20 kaj 30 homoj. Ĉiam ekestis de mem interesa kaj amuza programo, foje eĉ streĉa. Principe temas pri kombino de urbotrariĝo kaj bierumado en trinkejo. Planoj por venontaj jam ekzistas. Venonte oni renkontiĝos en la aŭstra-hungara limurbo Sopron februare, kaj poste iam maje, kiam pli varmas, Nora kaj Palma invitas al familia domo en suda Hungario.

Ĉiukaze ne videblas fino de la sukceso. Mi persone nur povas konsili al homoj en limregionoj provi organizi ion similan. Indas certe por vi mem kaj estas privarbebla programero por viaj komentantoj.

**Axel LEITNER (A.E.J.)**

INSTRUADO:

## *Kritikoj kaj Komentoj pri la Supera Ekzameno de ILEI*

□ Bernard GOLDEN (HU) (teksto reviziita en januaro 1996)

**Noto:** Tiu ĉi referaĵo estis prezentita kiel programero de la 9-aj Landaj Pedagogiaj tagoj en Budapeŝto la 26-an de februaro de 1994. Poste ĝi estis brodkastita en programo de "Esperantaj Novaĵoj" de Hungara Radio la 14-an de Marto 1994.

En novembro 1990 la komisiito pri organizado de ekzamenaj aferoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) dissendis al dudeko da konataj esperantistoj cirkuler-leteron pri la supera nivelo de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Akompanis la leteron la principa regularo kaj respondilo kun la peto plenumi ĝin kaj aldoni rimarkojn kaj proponojn. Mi respondis en decembro 1990, sed ĝis nun ne alvenis reago de la respondeculoj de ILEI rilate miajn sugestojn kaj demandojn. Pensante ke la temo interesos pli vastan publikon en Esperantujo, mi prezentas ĉi-sube la enhavon de mia respondilo.

### **Celo de la Supera Ekzameno**

Mia plej grava objekto kontraŭ la kvarpaĝa, detalplena regularo estas, ke ne estas prezentita klara kaj racia celo por la supera ekzameno. Estas necese neambigue respondi la sekvajn demandojn:

1. Por kiuspecaj homoj estas la ekzameno?
2. Kial ili bezonas tian atestaĵon?
3. Kiu rekonos ĝin en Esperantujo kaj kiel?
4. Kiu rekonos ĝin ekster Esperantujo kaj kiel?

### **Lingvaj normoj**

En la regularo lingvaj normoj ne estas **objektive difinitaj**. Estas ne realece postuli, ke kandidatoj havu kapablon «senerare» uzi la lingvon, kaj ke la disertacio devas esti «lingve senriproĉa».

Neniu en la Esperantlingva Komunumo povas plenumi tiujn kondiĉojn — nek la membroj de ILEI, kiuj sendis al mi materialon enhavantan lingvajn erarojn kaj nacilingvismojn, nek la tiel nomataj bonaj aŭtoroj, nek la membroj de la Akademio de Esperanto, nek Zamenhof mem!

Estas necese decidi pri la specoj kaj kvanto da eraroj, kiuj estu tolerataj en ĉiu parto de la ekzameno (ekzemple, gramatikaj solecismoj, semantikaj malĝustaĵoj, uzo de nacilingvismoj, prononceraroj k.s.).

Mi scias, ke inter la potencialaj membroj de la Supera Ekzamena Komisiono estas kelkaj, kies lingvouzo estas nek senerara nek senriproĉa. Se la ekzamenistoj ne kapablas plenumi tiujn severajn kondiĉojn, ili ne rajtas postuli, ke la kandidatoj faru tion.

### **Mankoj en la Supera Ekzameno**

Mankas en la Supera Ekzameno partoj temantaj pri scio de la fonetiko de Esperanto kaj normoj de bona prononco. Cetero, ne estas pritrakto de prononc-devioj. Ĝis kiu grado rajtas kandidatoj misprononci Esperanton, uzi nacilingvan prononcon, akcenti malĝustajn silabojn k.s.?

Alivorte, kiom da devioj estu tolerataj?

Por la parola parto de la Supera Ekzameno mi proponas, ke ĝi enhavu la sekvajn erojn.

- a. Deklamado: poezio, beletra prozo, teatraĵo
- b. Interpretado: (dudirekta)
  - i. Spontana konversacio inter du ekzamenistoj, unu parolanta en Esperanto, la alia en la gepatra lingvo de la kandidato.
  - ii. Simultana interpretado de prelegoj (dudirekta): Aŭskultante magneto-fonajn registraĵojn de partoj de prelegoj, la kandidato samtempe interpretas ilin esperante kaj gepatralingve.

### Honorarioj

La principa regularo de la Supera Ekzameno ne pritraktas la demandon pri honorarioj por membroj de la Supera Ekzamena Komisiono. Estas necese starigi regulojn pri honorarioj pagotaj al ili por diversaj aspektoj de ilia laboro kaj por la elspezoj, kiujn ili havas.

### Konkludo

Mi esperas, ke kelkaj el la temoj, kiujn mi tuŝis en tiu ĉi artikolo, servos por plua pridiskutado okaze de seminarioj kaj konferencoj de instruantoj de Esperanto. □

## NOVOS CURSOS

A partir de 30 de Novembro, sábadu, terão início na sede da Associação Portuguesa de Esperanto os cursos para o ano escolar 96/97. Tal como foi hábito até recentemente, os cursos estarão estruturados em três níveis (iniciação, treino e aperfeiçoamento), denominados **Esperanto 1, Esperanto 2 e Esperanto 3**, e serão ministrados por João José SANTOS, Gonçalo NEVES e António MARTINS. Todos os interessados deverão deixar o seu nome, contacto, idade e outras informações na sede, 24 h por dia (01 714 13 59). Os interessados nos cursos de nível 2 e 3 deverão ter diploma do grau anterior ou submeter-se a exame prévio a realizar no sábado, 23 de Novembro.

**Propina:** 6000\$00 para não-sócios (com inscrição opcional na A.P.E.) e 2720\$00 para sócios. Os cursos

A secção juvenil *Portugala Esperanto-Junularo* organiza **cursos intensivos** dirigidos à sua faixa etária (sócios com menos de 30 anos). Decorre um neste momento e prevê-se outro para as férias do Natal. AM

## Mazi por TV en profesia formato!

La Internacia Esperanto-Instituto informas, ke estas preparata dissendo de la fama "Mazi"-video-kurso kiel TV-serio pere de landaj kaj lokaj televidaj stacioj laŭ la profesia sistemo BETACAM.

La kostojn de tiu adapto pagas la Instituto, sed poste ĉiu TV-stacio devas

aparte pagi la licencon por la rajto dissendi la kurso-serion.

Pli detalajn teknikajn informojn bonvolu peti rekte ĉe la IEI-kunlaboranto kaj eldonisto TOMMY Publishers, Tomasz Wojciechowski, ul. Kasprowicza 30/15, PL-01 871 WARSZAWA, Polio. □

RECENZO:

## Língua internacional Curso sem mestre

Newton MONTEIRO  
Edições Nosso Lar: São Paulo, 1995  
80 pĝ., 27 cm × 19 cm  
Kolora kovrilo.

La kovrilo montras 13 flagojn: la unua estas la flago de Brazilo, la dua estas la Esperanta. Poste aperas 11 flagoj de la jenaj landoj: Portoriko, Kanado, Britio, Francio, Germanio, Italio, Aŭstrio, SaudArabio, Ĉinio, Japanio kaj Aŭstralio.

Ŝajnas strange ke, estante libro en la portugala lingvo por lernado de Esperanto, ne aperu la flago de Portugalio en la grupo de la jam menciitaj flagoj.

Inter la ses ĉapitroj de la indekso estas du, kiuj starigas la kernon de la libro: *Curso de Esperanto sem mestre*, en la paĝo 11-a *Chave de Ouro* — klarigoj de la lekcionoj en la paĝo 37-a.

Ĉiu el ĉi du ĉapitroj entenas 96 alineojn kiuj kovras la tutan gramatikon, ekde la vokalojn, duonvokalojn kaj konsonantojn, prononcadon, artikolon, substantivon, adjektivon, numeralojn, pronomojn, verbojn, adverbojn, k.t.p., sed laŭ ne ordigita formo — kvankam asimilebla.

La baza enhavo estas elmontrita en la paĝoj 13-a ĝis 36-a samtempe kun malgrandaj ekzercoj, kiujn la lernanto devos solvi kaj poste kompari kun la solvo, kiu estas montrita en la alineo kun la sama numero inter la paĝoj 39-a kaj 57-a de la

ĉapitro titolita *Chave de Ouro*. Ĉiuj paĝoj ekde la 13-a ĝis la 34-a entenas en la suba alineo unu vortareton esperanta-portugalan rilatanta la aferon de la sama paĝo. Sed, konsiderante ke la libro ne entenas la vortaron esperanto-portugalan de la tuta enhavo, endas ke la lernanto observu la konsilon donita en la paĝo 10-a de la libro, celante la ellaboradon de alfabeto sliparo, en kiun li devos transkribadi ĉiujn novajn vortojn aperintaj en ĉiu paĝo. En la paĝoj 71-a ĝis 79-a, sub la ĝenerala titolo *Vocabulário* troviĝas vortoj portugalaĵ-esperantaj aranĝitaj laŭ ĉi aferoj: *La korpo, la familio, nutaĵoj, fruktoj, kreskaĵoj, trinkaĵoj, en la kuirejo, vestoj, la domo, en la domo, floroj, terbestoj, akvobestoj, insektoj / bestetoj, birdoj, instruo / studo, lernejo, sezonoj, semajno, monatoj, la tempo, la urbo, sportoj / ludoj, sonoj / bruoj, bestovoĉoj, teksaĵoj, muziko, agoj*.

Ĉi tiu elekto de titoloj por la vortaro ŝajnas tro subjektiva kaj do ĝi rezultas malmulte objektiva, malkuraĝigante la lernanton rilate la serĉadon de vortoj. Ekzemple, oni ne trovas la signifon de "zero", ĉar ne ekzistas en la libro la vorto "nulo".

La paĝoj 62-a kaj 63-a prezentas resumon pri la uzado de adverboj, konjunkcioj kaj prepozicioj, en kiu oni rimarkas la mankojn de kelkaj el tiuj nevarieblaj vortoj, inter kiuj, la kondiĉa konjunkcio "se". La paĝo 58-a prezentas la tabelon de la korelativaj vortoj.

Resume, temas pri baza libro, kun bela grafika aspekto kiu uzas didaktikan metodon alvokante la deduktivan senson de la lernanto, sed klarigante en la ĉapitro *Chave de Ouro* la dubojn kiuj estu restintaj al la lernanto okaze de la ĉapitro titolita *Curso de Esperanto sem mestre* ekde la paĝo 11.

Franco SIMÕES

•••••  
• **Internacian infandesegnan konkur-** •  
• **son** organizas Kroata Esperantista Unu- •  
• iĝo (☒Sveti Duh 130,HR-10000ZAG- •  
• REB). Ĝis 15-jaruloj sendu konkursaĵon •  
• en minimuma formato 20×30 cm. ☐ •  
•••••



LINGVO:

**"Mesmo" esperanten multmaniere**

□ Faria de BASTOS

La portugala vorto "mesmo" estas laŭ mia sperto tiu kun pli da ebloj de malsamaj tradukoj esperanten. Ne malmultaj esperantoparolantoj ofte ne dece distingas inter ili. Kelkaj kutime tradukas la vorton "mesmo" per "mem" sendepende de la konkreta kazo. Ne mirindas tamen ĉi-afere, se konsideri ke eĉ Albault, la iama prezidanto de la Akademio, antaŭ kelkaj jaroj skribis (glite, mi kredas, malgraŭ kontraŭuloj) la vorton "mem" anstataŭ la vorton "eĉ", pro influo de la franca "même".

Ni prenu la plej simplan ekzemplon: "Eu mesmo o vi". La traduko jenas: "Mi mem vidis lin".

Alikazan ekzemplon: "Mesmo à tangente". Tradukon: "Ĝuste apenaŭe".

Diversspecan ekzemplon: "Eu vi-o mesmo", kun la signifo "Eu até o vi". La bona traduko estos: "Mi eĉ vidis lin".

Kvaran ekzemplon: "Ele é sempre o mesmo". Tradukite: "Li estas ĉiam la sama".

Proksiman ekzemplon: "O mesmo

me aconteceu". Tradukite: "La samo okazis al mi".

Sesan ekzemplon: "Eu estava mesmo ao lado". Taŭgan tradukon: "Mi estis tute apude".

Sepan ekzemplon: "Era mesmo ele?". Tradukon: "Ĉu vere estis li?".

Okan ekzemplon: "Mesmo triste, ela sorriu". Tradukon: "Malgraŭ malĝoja, ŝi ridetis".

Naŭan ekzemplon: "Cheguei mesmo agora". Tradukon: "Mi ĵus alvenis".

Dekan ekzemplon: "Isso tinha mesmo de acontecer". Tradukon: "Tio ja devis okazi iam".

Dekunuan ekzemplon: "Que ele venha ou não, para mim é o mesmo". Tradukon: "Ke li venu aŭ ne, estas por mi indiferente".

Dekduan kaj lastan ekzemplon: "Assim mesmo, não desisto". Tradukon: "Mi tamen ne rezignos".

Ĉi-ekzemploj utilas finfine por pli bone komprenigi al ni la multnuancon de nia portugala. □

**Stipendio «Ivo LAPENNA»**

Memore al prof. d-ro Ivo LAPENNA (1909-1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo kaj ties aplikado en la scienco speciale, Fondaĵo Ivo Lapenna starigis lianoman stipendion, kiu konsistas el subvenciado al disertacioj je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licenciĝoj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de Zamenhof kaj Lapenna. En 1997 ĝi povas

esti aljuĝita al disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaro 1996. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio b.v. peti detalan regularon de la sekretario-kasisto de Fondaĵo Ivo Lapenna, Torben SVENDSEN, ✉ Vanlose Allé 57, DK-2720 VANLOSE. Tempo-limo estas 1997.02.28. Sendu (du ekz.) al Klaus PERKO, ✉ Lendkai 111, AT-8020 GRAZ, ✉ lapenna@cybernet.dk, ☐ http://www.worldnet.net/~bmasala/FIL □

POEZIO:

## Incógnita

*Sou forasteira, aqui, sem pedra ter ou lenho em que repouse a fronte incendiada, não sei para onde vou, nem de onde venho, não sei se é longe ou breve a caminhada.*

*Não sei se me pertence o que aqui tenho, árvore velha às rochas arrancada, bronze quebrado com que não me empenho sendo o que sou prefiro não ter nada.*

*Serei santa talvez, talvez presságio, dum incontível orbe a expansão, em estilhaços lunares submerso.*

*Espuma gigantesca dum naufrágio, fragmento do cosmo em suspensão a lucilar na orla do Universo.*

La ĉi-supran soneton verkis portugallingve Alsácia Fontes MACHADO dediĉe al sia amiko José Augusto PIMENTEL, kaj estis publikigita en 1990.11.19 en *Gazeta das*

*Caldas*. Omaĝe al tiu karmemora kaj elstara membro de nia komunumo, NB klopodis organizi tradukkonkurson (vd. NB64). La tri konkursaĵoj ricevitaj ĝis la 1994.06.17 — la 81-a datreveno de ŝia naskiĝo — estis submetitaj al la takso de du eminentaj portugala-kaj esperant-lingvaj poetoj — Leopoldo KNOEDT kaj Geraldo MATTOS, kun invito al elekto de plej taŭga traduko. Tamen, diversajmalfacilaĵoj malebligis tiun ĉi altnivelan kunlaboron kaj tial NB decidis anstataŭigi la spertulan takson per 'popolsenta' aprezo. Publikigante la alvenitajn konkursaĵojn (sen tradukint-nomo) ni do alvokas al ĉiuj leganto de NB (membroj kaj abonantoj) esprimi sian preferon ĝis 1996.11.19 (aŭ efektive ĝis firdakto de NB71) — ses jarojn post la originala premiero.

La verkaroj de la portugala-Esperantiaj forpasintoj meritas cetere atenton, kaj P.E.A. alvokas do al ĉiuj interesatoj pri tiu temo kontakti la sidejon por eklaboro. AM

TRADUKO «A»:

## Nekonata

*Mi fremdas tie-ĉi, sen ŝton' aŭ ŝtip' kien kuŝigi mian frunton fajran, mi nek scias kien, nek el kie, ĉu foras aŭ ĉu baldaŭ mia kaj'.*

*Ĉu posedas mi kion mi havas? — arbo malnova el rokgrund' eltirita, rompita bronz' kiu ĉe mi vane kavas — mi tiel ĉi nenion trovas posedinda.*

*Estas mi sanktulo, eble aŭguro, de nehaltebla globo ekspansio mergita en lunspliterobskuro,*

*ŝipo-drona ŝaŭmondo el nenio, eta ero de la svaga kosmstrukturo scintilanta ĉe la rando de ĉi-ĉio.*

TRADUKO «B»:

## Inkognita

*Mi fremdas, ĉi tie, sen ligna baz' aŭ ŝtono, Sur kiuj nun ripozus mia arda kapo.*

*Mi ne scias kien, de kie vojas mia sono, Mi ne scias ĉu longas aŭ kurtas l' etapo.*

*Mi ne scias ĉu al mi propras mia ono; arb' maljuna, ŝirita for el rok' per skrapo, Bronz' rompita, kiun mi traktas sen impono; Ĉar tia, de l' havaĵoj tentas min eskapo.*

*Sankta mi estas, eble, aŭ eble aŭguro, De neentenebla ŝfrero l' ekspansio, Mergiginta en disaj splitoj de la luno.*

*Giganta disaŭmo de ŝiprompa aventuro, Fragmento de la kosm' en suspensio, Scintila rande de la universa nuno.* ▶

Kaj jen kontribuo de membro nia al tiu ĉi nekutima poezia paĝo de NB:

## Aŭtuno

*Pluventus agrable, estas aŭtuno.  
Folietoj ŝvebas en la aero,  
kelkfoje nin rigardas la Suno,  
novaj vivoj ĝermos sur la tero.*

*La vintro alvenos — venos tre baldaŭ  
la pluvo, la neĝo kaj la frostiĝo.  
Tiam Naturo dormos ankoraŭ:  
horon atendas ĉio por vekigo.*

*Alvenos marto, suno varmiĝos,  
la birdetoj pepados gajege,  
tiam la printempo ekvekiĝos,  
verdaĵoj ekaspektos belege.*

*Venos aprilo kaj maj' kaj junio,  
el floroj la kampoj tre koloriĝos.  
Alvenos somero, estos julio,  
tempo por ferioj, ĉio varmiĝos.*

Augusto PEREIRA Júnior

◀ TRADUKO «C»:

## Nekonatulino

*Tie-ĉi, ja, mi estas fremdulin'.  
Por ke ripozu la vizaĝ' flamita,  
Ŝtono aŭ ŝtip' mankas al mi:  
destin' de nekonataj vojoj disportita.*

*Ĉu apartenas min la oldvirin',  
"malnova arbo" el la rok' ŝirita?  
Tiel estante mi, ne gravas min  
havi nenion, bronzo disrompita.*

*Mi estos eble sankta aŭ aŭguro,  
la ekspansio orba, sen ajn muro,  
volvita en dronantaj lunaj splitoj.*

*Ega marŝaŭmo pro tragika vento,  
pendita kosma ero, lumfragmento,  
tra Universo, plena da meditoj.* ◻

MOVADHISTORIO:

Esplorado en la sideja spolio de Adolfo NUNES aperigis kelkajn interesajn poem-tradukojn kiujn ni jen publikigas en NB.

## Defalinta folio

— *De trunketo disigita  
Vi, malgaja, sekigita,  
Kien iras, folieto?*

— *Vento kverkon ruinadis  
Kiu min sur si tenadis;  
Tiam, tute fordronanta  
Min al vento forfluganta  
Mi trakuras en momento  
Valon, monton, kun la vento;  
Kaj en tiu ĉi movado  
Mi vojaĝas sen timado  
Kun folio de la rozo  
Kaj folio de la laŭro  
En la tuta vivodaŭro!*

João de DEUS

(trad. Costa e ALMEIDA (?))

## Pala kaj blonda

*Ŝi mortis! En malvasta ĉerko' sternita,  
palega, blonda — blonda kaj malvarma,  
Ŝi ridetadis kun malĝojo ĉarma,  
Kiele se de virga song' lulita.*

*Lili' velkanta sub la roso larma,  
Ŝi ripozis sur la lito lasta,  
La neĝaj manoj sur la brusto ĉasta,  
palega, blonda — blonda kaj malvarma.*

*Kvazaŭ de kant' arto [tiel!] la diino,  
Kvazaŭ pala, laca, monakino,  
ŝi dormis en la ĉerko, ŝi la ĉarma.*

*Per kurb-ungeg', forprenis ŝin la morto,  
por ŝin forgesi mankas al mi forto,  
palega, blonda — blonda kaj malvarma.*

Antônio FEIJÓ

(trad. Costa e ALMEIDA)

MOVADHISTORIO:

## *Membiografiaj notoj de Alberto Pedro da Silva kiel esperantisto (V-a kaj lasta ero)*



...«En la numero 33, Julio 1978, la gazeto *Voz Anarquista* publikigis mian artikolon “*Esperanto — Lingua Universal*”, per kio mi respondas al “*suelto*” de s-ro Álvaro da Silva e SOUSA. Je la jaro 1908 ĉi tiu sinjoro aŭdis, unuafoje, ion pri Esperanto, kiun li konsideris senviva ankoraŭ en la jaro 1978.

Ekde la numero 35, septembro 1978, ĝis la numero 54, marto-aprilo 1981, la sama gazeto publikigis, sub la titolo “*Esperanto — Lingua Universal*”, mian adaptaĵon de “*Perletera Esperanto-Kurso*”. Celante liveri pliajn argumentojn por la serio de artikoloj publikigitaj sub la ĝenerala titolo ““*Paraíso*” *da Bulgária*”, mi sendis al la redaktejo de *Voz Anarquista* tekstojn prenitajn el leteroj adresitaj al mi. Estis mia deziro, ke tiuj tekstoj estu aplikataj kiel skizoj kaj informiloj por artikoloj verkotaj de la fakgvidanto. Anstataŭ tion, ili uzis la tekstojn tiaj, kiaj ili estis kaj surmetis la titolon: “*O Esperanto maltrata do “paraíso” da Bulgária*”, kio estas ekster la vera senco de la skizoj, kaj publikigis ilin en la numero 38, januaro 1979. Konsekvence kaj prave s-ano José Augusto de Castro sendis al mi leteron pri ĉi tiu afero, kiu estis publikigita en la numero 40, aprilo 1979, de “*Voz Anarquista*”.

Ekde la n-ro 14 — somero 1979 — mi tradukas esperanten “*Resumo*”jn pri la enhavoj de la revuo “*A Ideia*”. La direktoro de ĉi tiu revuo proponis al mi la kompiladon de gramatika teksto por flugfolioj sub la titolo “*O Esperanto*”, kio estis publikigota kiel suplemento al la n-ro 20-21, vintro-printempo 1981. En la n-ro 22-23, novembro 1981, estas publikigita mia artikolo “*Esperanto: uma lingua para todos*”.

Dum telefona interparolo kun s-ano Hernâni Araújo RESENDE ni interkonsentis, ke li venu ĉe min. Tiel okazis nia unua kunsido, kaj naskiĝis nia amikeco sincera, kiu daŭras ĝis hodiaŭ. Li sugestis organizi la tekston de demandaro sendota al malnovaj esperantistoj kaj al familianoj de tiuj, kiuj jam mortis. La celo estis la kolektado de fidindaj elementoj pri la historio de la esperantista laborista movado en Portugalio, eldonota je la jubilea jaro 1987. Mi ĉion faris, kio eblis al senspertulo pri historiaj aferoj, ties metodoj kaj rimedoj. Li gvidis min al plenumendaj taskoj kaj laŭŝajne mi rikoltis bonajn indikojn en antikvaj gazetoj kaj aliaj publikigaĵoj. Tial mi slipigis multajn nomojn de esperantistoj, esperantaj societoj, kaj aliajn indikojn utilajn al la celo. Profitante la okazon, mi kunigis sciindaĵojn por biografiaj

skizoj de esperantistoj. Ili estas sufiĉe multaj, sed neperfektaĵoj kaj nekompletaj. Fine mi ricevis afablan leteron kaj la kunlaboro restis tia, kia ĝi estis ĝis tiu dato, sed saviĝis la amikeco, kiu estiĝis inter ni.

En la n-ro 94, aprilo 1983, de "*A Batalha*", estas publikigita mia artikolo kun la titolo "*Esperanto e os trabalhadores*".

Denove "*A Ideia*", n-ro 32-33, Aprilo 1984, publikigis artikolon "*Esperanto em Movimento*", kiun mi verkis laŭ invito de la direktoro.

La saman jaron mi legis la verkon "*Etaj Rakontoj*" kaj laŭ invito dela aŭtoro, s-ano Eduardo Rosa, mi listigis ĉiujn lingvajn uzadojn, kiuj tiklis mian sentemon. Majon de 1985 s-ano Eduardo Rosa donacis al mi ekzempleron de miaj tradukoj de kelkaj poeziaĵoj de prof. Fernando SYLVAN. La sama samideano, je la nomo de la Jubilea Komitato por la unua jarcento de Esperanto, invitis min aranĝi adaptaĵon de "Perletera Esperanto-Kurso" por eventuala publikigo en la regiona gazetaro dum la jaro 1987. Mi konsentis fari ĉi tiun laboron, kvankam mi ne tre esperis sukceson, ĉar por interesigi la gazetgvidantojn necesas ke ili antaŭsentu la intereson de la publiko-legantaro, ĉe kiu nenio estis entreprenata de la respondeculoj de PEA en tiu senco. Nuntempe tra la lando oni parolas sufiĉe pri Kulturo kaj starigo de kulturaj organizaĵoj. Do, Esperanto estas kultura afero. Kio estas farata por dissemi la lingvon en tiuj grandoj, eble fruktodonaj? Jen la problemoj.

Ekde 1953 ĝis 1967, mi ricevis "*Dokumentoj*", publikaĵoj de k-adoj Gedazin, kaj interkorespondis kun ili. En la n-ro 12, februaro 1961, aperis mia interveno kaj la respondo de k-do prof. L. Maurat.

En la n-ro 26, marto-aprilo 1986, de "*Nia Bulteno*", estis publikigita mia opinio pri la vorto "Planedarejo", aperinta en la n-ro 22, julio-aŭgusto 1985.

S-ro S., ne atentante pri la etikaj principoj, pretendas kontraŭstari miajn argumentojn uzante lokon por sia artikolo en sama paĝo, malsupre de la mia.

Estas rimarkebla la ĉefa celo de s-ro S.: malamikece, furioze, vipi tiun aŭdacan Alberto SILVA, kiu arogis al si dubi pri la ĝusteco de tiu vorto.

S-ro S. estis malbonŝanca pro la rapideco de lia nesufiĉe pripensita argumentaro, malforta, konfuza, kiel oni povas konstati per la originalo. Krom la aliaj punktoj de lia artikolo ne utilas al la temo ĉar mi ne volas lerni la anglan lingvon. Per la legado de lia artikolo, mi pli firmiĝas en la opinio ke s-ro S. malpli scipovas Esperanton ol li supozas.»

Alberto Pedro da SILVA

P.S. — Forpasinte la pasintan majon, kiel ni sciigis ĉiujn geesperantistojn kaj membrojn de nia Asocio, s-ano Alberto Pedro da Silva lasis nekompleta sian Membriografion. Sed lia longa vivo, daŭrinta 89 jarojn, estas sekvinda ekzemplo por tiuj, kiuj deziras pliriĉigi la homaron per la senlaca strebado al pli feliĉa estonto. WS

MANIFESTO DE PRAGO:  
 La Universala Kongreso aprobis  
 historian dokumenton pri la difino  
 de Esperanto en la nuna mondo:  
**Legu ĝin!**  
**Subskribu ĝin!**  
**Vivu ĝin!**  
 vidu pĝ. 9 kaj petu ekz. el P.E.A.

## PASPORTA SERVO 96/97: 68 LANDOJ, 784 GASTIGANTOJ

Martin BURKERT



TEJO ĝoje anoncas la naskon de *Pasporta Servo 96/97*, la plej freŝa kaj aktuala eldono de la jam mondkonata adreslisto de esperantistoj, kiuj pretas senpage hejme gastigi aliajn esperantistojn.

Tuj, kiuj jam konas antaŭajn eldonojn de *Pasporta Servo*, rimarkos, ke ĝia aspekto iom ŝanĝiĝis. Post aŭskultado de kelkaj uzadintoj, ni inter alie decidis uzi pli malgrandajn formaton (tiu de UEA Jarlibro, kun 128 paĝoj) kaj krome dividi la landojn laŭ kontinento.

Ni speciale fieras pri la maparo indikanta loĝlokojn. Antaŭe ĝia desegnado (kun tieseraroj) ĉiam bezonis ŝvitiĝan noktaron da laboro kaj multe da gluo kaj korektofludaĵo, sed nun la evoluinta tekniko helpegis nin: la mapoj estas komplete desegnitaj per komputilo. Martin BUR-

KERT denove desegnis por ni la frontpaĝon.

La nombroj de gastigantoj (784) kaj landoj (68) estas malpli altaj ol en la antaŭa eldono. Sed ni aŭdace asertas, ke la nombro de validaj adresoj estas tamen pli alta; 100%-an validecon tamen ni bedaŭrinde neniam povas atingi, pro la translokiĝemo de junaj esperantistoj.

Ĉiuj listigitaj gastigantoj ricevas la libron senpage perpoŝte. Aliaj povas aĉeti ĝin kontraŭ modesta prezo.

**Jeroen BALKENENDE**

[Prezo: 1500\$00, ĉe la P.E.A.-libroservo, ella mendstoko de PEJ. La ĉi-paĝa bildo kovrilis la pasinjaran eldonon. NDIR]


## Al-Andaluz: Lirikaj perloj de l'Araba Iberio

António Marco BOTELLA, konata hispana aktivulo, eldonis finfine libro-forme siajn tradukojn el la arabepoka iberia poezio. Temas pri nepre malkovrenda mondo, tiom ofte ignorata de ni, portugaloj (escepte per la "migdalarka legendo" aŭ kelkaj "sorĉmaŭrinoj") — la mirindaj riĉo kaj klero de l' araba civilizo rafiniĝinta en Iberio (*Al-Andalus*), en epoko kiam en Eŭropo eĉ reĝoj analfabetis kaj banado estis evitenda ekscentraĵo. Kontraste kun la tiamaj kristanaj socioj (kaj kun la nunaj islamaj...), *Al-Andalus* estis rare tolerebla kaj malfermita socio, kie kunvivis egalece civitanoj arabaj, hebreaj kaj mozarabaj (kristanaj), kaj kie la virinoj ĝuis egalrangan pozicion. Arto kaj scienco plejgravis en tiu epoko (ĉ. 800-1300), kiam Kordovo estis sendispute la plej brila urbo en Okcidenta Eŭropo. *Lirikaj perloj de Al-Andalus*, 327-paĝa verko reeldonita pasintjare de Hispana Esperanto-Federacio, prezentas verkojn el 179 poetoj kaj haveblas en nia Libro-Servo postmende; la prezo rekte ĉe HEF estas 1900 ESP. AM

QUOTAS:

# T-shirt premeia quotas em dia




O habitual sorteio trimestral de uma *T-shirt* entre os sócios com as quotas em dia realizou-se em 1996.09.28, referindo-se aos trimestres de 1996.01-03, 1996.04-06 e 1996.07-09. Foi efectuado através de lançamento de dados, na presença de um membro da Direcção e de dois sócios. No primeiro concurso, saíram os números 1002, José Joaquim MENDES, da Amadora, que não tem a suas quotas em dia, e 0899, Celeste FARI-



NHA, de Lisboa, que, por ter as quotas em dia, ganhou a *T-shirt* do prémio. O segundo concurso contemplou o número 1200, José Luís ABREU, de Barcouço, Mealhada, que tem as suas quotas em dia e foi premiado. Finalmente, no terceiro concurso saíram os números 1240, Elizabeth PEIXOTO, de Lisboa, que não tem a suas quotas em dia, e 524, Alexandre KASESA, de Lisboa, que, por ter as quotas em dia, ganhou a *T-shirt* do prémio. Os premiados podem levantar o seus troféus na sede da Associação ou recebê-la por via postal, após pedido indicando o tamanho. Relembramos que o mês da última quota paga de cada sócio aparece na cinta do *Nia Bulteno*. "9611", por exemplo, é Novembro de 1996, estando atrasadas todas as quotas pagas até antes desse mês. Se junto à data estiver um "[ ]" em vez de um "[#]", então mande-nos uma foto sua para a ficha. AM

SIDEJO:

# Malgranda mondo

Dum pasinta aŭgusto en la sidejo de nia Asocio svarmis eksterlandaj gastoj: Brian KRUGER, el  Usono, A-komitatano de TEJO (vd. pĝ. 12), turismis en Portugalio unu semajnon, ĵus reveninta el la I.J.K. Lian viziton  zorgis Alcino ALVES. Dimi-tär PAPAŖOV, prezidanto de Bulgara Esperanto-Centro, kaj ties familio ankaŭ ĝuis la gastamon de nia sidejo, kie amfitrionis Faria de BASTOS. Vizitante Portugalion dum kvin semajnoj, Irina TUVAL-KINA, el Ĉuvaŝio (Rusio),  vizitis eĉ plurfoje nian sidejon. Ŝian viziton akompanis António MARTINS. Bedaŭrinde, ĉiuj akceptantoj forgesis peti al "siaj" gastoj subskribi la *Libron de la Vizitanto*, interesa movadhistoria dokumento de nia sidejo. AM

.....

• P. E. A. URĜE BEZONAS •

• **Periodaĵan** •

• **Bibliotekiston** •

• Revuoj, gazetoj, ĵurnaloj, magazinoj, bultenoj, novaĵleteroj, organoj kaj paskviloj: ili noticas la realon de Esperanto hodiaŭ, kaj unike sciigas pri ĝia historio. Plej proksima: **periodaĵa bibliotekisto**. Por taŭge plenumi tiun fascinan taskon necesas: minimuma sperto pri esperanto, elbleco pasigi kelkajn horojn semajne en la sidejo kaj minimuma lerto pri komputado aŭ lernemo pri ĝi. Interesatoj kontaktu tuj la sidejon!

.....

## LIBROSERVO:

**2-a aldono al la Katalogo aperinta en NB67**

## Novaj Titoloj

□A. da Silva ALMEIDA

- 01.018 *Lingua Universal "Esperanto"* ..... Jayme Heinlein FERREIRA ..... 50\$00  
— *Methodo Completo* (1889)
- 02.034 *ABC-Gramatiko de Esperanto* ..... de Vleminck & van Damme .. 5500\$00
- 02.035 *Gramatika ABC-Praktikilo* ..... de Vleminck & van Damme .. 3200\$00
- 02.038 *Komplementoj de l'Verbo*, ..... D. Quarello ..... 100\$00
- 02.039 *Komplementoj de l'Substantivo* ..... D. Quarello ..... 100\$00
- 05.006 *La Laŭta Vekhorloĝo* ..... Stefan MacGILL ..... 400\$00
- 05.027 *Malgranda Rano Flugis kaj Falis* .... Ĝ. Ĝiĝjung ..... 350\$00
- 08.129 *Sep Krimnoveloj* ..... R. C. Gates ..... 1370\$00
- 13.022 *Saniga Menuo* ..... Kristina-Maria LUTE ..... 700\$00
- 15.006 *La Veraj Interparoladoj de Sokrato* .... Han RYNER ..... 600\$00
- 20.009 *Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj* .... Jon ROMESMO ..... 950\$00

## Elĉerpitaj Libroj

- 01.002 *Baza Esperanto*
- 01.005 *Primeiro Manual de Esperanto*
- 01.010 *Esperanto Sem Mestre*
- 02.006 *Ellernu! Progresu Kurso de Esperanto*
- 05.009 *La Malgranda Sorĉistino*
- 05.013 *La Fiera Multkolora Kateto*
- 05.041 *Liliputo*
- 06.013 *Facetoj de Esperanto*
- 06.014 *Internacia Komunikado*
- 08.001 *La Imperio Ornaks*
- 08.006 *Malfacilas Esti Dio*
- 08.009 *Norda Odiseado*
- 08.024 *El la kara Infaneco*
- 08.058 *Mistera Lumo*
- 08.060 *Noveloj*
- 08.096 *Varmas en Romo*
- 09.007 *Kun Sopira Koro*
- 13.001 *Amuza Matematiko por Gelernantoj*
- 14.021 *Zamenhof, Iniciador do Esperanto.*
- 15.001 *Diskurso Pri la Metodo* ▶

15.006 *La Veraj Interparoladoj de Sokrato*15.009 *La Konflikto*19.014 *La Sankta Biblio*20.005 *Internacia Kantaro*

## Korekto de Titolo

18.001 *Survoje al IPE — Internacio de Proleta Esperantistaro*

## Korekto de aŭtoroj

06.028 *Georgo KORYTKOWSKI*12.002 *Carlo GOLDONI*


## Novaj Prezoj

01.008 *Suplemento Junulkurso* .... 150\$0008.083 *La Stultaj Infanoj* ..... 750\$0011.007 *Asteriks kaj Kleopatra* .... 1800\$00

## Novaj kodoj

10.011 *Sub la Signo de Socia Muzo*  
(eks-08.085)13.004 *Pri Nia Universo*  
(eks-16.003)





En la komenco ĉefe necesis “ĉapeli”. Taŭge aperigi la ĝustajn supersignojn kaj ekrane kaj papere estis problemo demandantan fakan solvon en plej multaj komputiloj kaj programoj. Ĉapelilo 1 markis la finon de tiu epoko. Nun, la uzanto postulas plenan uzon de esperanta redaktprogramo, en *Windows* (plej uzata “amika” medio), kun esperantlingvaj helptekstoj, menuoj kaj komandoj, kapabla taŭge dividi la esperantajn vortojn, kontroli kaj korekti la esperantan ortografion, kaj importi jamajn tekstojn en plej diversaj formatoj (cx, cxw, ch, c^, c') — kiujn trudis (kaj trudas) tiuj primitivaj sistemoj. Tia estas Ĉapelilo 2.0. Ĝus aperinta, ĝi prezentigas kiel avangarda kaj unika rimedo por serioza kaj konsekvenca vere esperantlingva redaktado en *Windows*. Novajn tiparojn (i.a. tiujn uzitajn por *NB*), vortdividilon, pli oportunan klavartakton, plibonigitan literumilon, aldonajn tekstformatojn, esperantlingvan aŭtomatan daton, k. m. a. Ĉapelilo 2.0 kostas 33 500\$00 el la Libro-Servo de P.E.A. kaj speciala rabato atendas la aĉetintojn de Ĉapelilo 1.x. La Zamenhofa *Esperanta Proverbaro* kompletigas la pakon. AM

## Post morto de Ada Heroldo ĉe LF-koop

De post la bedaŭrata morto de Ada FIGHERA-SIKORSKA, ties redaktoro dum 37 jaroj, la mondkonata ĵurnalo *Heroldo de Esperanto* tamen ne orfas. Laŭ kontrakto subskribita ankoraŭ dum vivo de sia redaktoro, la titolon transprenos Kooperativo de Literatura Foiro ekde 1997.01.01. La laboron redakti, administri kaj komposti (kiun Ada plenumis preskaŭ sola) transprenos Marco PICASSO (respondeca redaktoro) kaj Perla MARTINELLI (redaktoro), kiu tiel pluas la jam 76-jaran tradicion de *HdE*, fondita de Teo JUNG kaj de li redaktita tra du mondmilitoj. Al vidvo Gian Carlo FIGHERA, elstara esperantista ĵurnalista, homo milda kaj rekta, P.E.A. prezentas plej sinceran kondolencon. AM

## Esperanta laserdisko

Komputila laserdisko (CD-ROM) pri esperanto estos disdonita al ĉiu partoprenanto de la Kongreso de Eŭropa E-Unio en Stuttgart (vd. pĝ. 11) kaj oni serĉas esperantlingvajn kontribuojn por la diskedo, specife: bild-, son-, kaj vide-dosierojn; **senkopirajtajn** tekstojn, originalajn kaj tradukitajn al esperanto (pri diversaj temoj); prezenton de esperantaj organizoj, komputilajn programojn, lernhelpilojn, k.m.a. Interesatoj kontaktu: Stefan FISAHN ✉ Friedrich-Ebert-Straße 71, DE-70191 STUTTGART ☐ <fisahn@hbi-stuttgart.de>. ☐

Laŭ tute ĵusa informo, forpasis aŭguste la eminenta portugala esperantisto **António Correia COIMBRA**. Nekrologo en *NB71*.

**RADIO:**

Esperanto-Klubo "La Espero", en Antananarivo, funkcigas esperantan radion. Komence, ĝi elsendos per FM, je 94 MHz. Oni planas pli poste atingi la plejn forajn landojn de Afriko per mallongaj ondoj. La aferon realigas skipo da junuloj kun la helpo de Eugene RAVELOSON. Sendu esperantajn muzikaĵojn por ilustrati la programon al la Nicole Julie ANDRIATSARAFARA ✉ Lot. II. 56bis, 1<sup>re</sup>, Analamahitsy Tanana, MG-101 ANTANANARIVO, Malagasio. □

**INTERNACIAJ BRODKASTOJ:**

Horo (UTC)	Stacio	Frekvencoj / kHz aŭ	☼satelito	Ricevareoj
<b>Ĉiutage (1-7)</b>				
04:30-05:00*	Polonia	☼1		Eŭropo
11:00-11:27	Beijing	6955, 9480		Japanio, Koreio
13:00-13:27	Beijing	11840, 11650		Sudorienta Azio
13:30-14:00*	Polonia	7145, 7285, 9525, 6000, ☼1		Eŭropo
17:25-17:30*	Polonia	☼2		Eŭropo
18:00-18:30*	Polonia	☼1		Eŭropo
20:00-20:27	Beijing	7405, 9965		Eŭropo
20:30-20:55*	Polonia	6035, 6095		Eŭropo
22:30-22:57	Beijing	9480, 11500, 6950		LatinAm. Eŭropo
<b>Dimanĉe (1)</b>				
04:30-04:55*	ORF	6155, ☼3		Eŭropo
07:00-07:30	Habana	6195		PacifikAzio, NordAm.
11:30-11:55*	ORF	6155, 15450, ☼3		Eŭropo, OrientAzio
14:30-14:55*	ORF	6155, ☼3		Eŭropo
15:00-15:30	Habana	9550		Amerikoj, Karibio
19:20-19:30*†	Vaticano	527, 1530, 5882, 4005, ☼4, ☼5		Eŭropo, Amerikoj
19:30-20:00	Habana	13715		Eŭropo, Mediteraneo
22:00-22:30	Habana	13715		Eŭropo, Mediteraneo
<b>Mardo (3)</b>				
19:30-19:45*	Eesti	5925		Eŭropo
<b>Merkredo (4)</b>				
19:20-19:35*	Vaticano	1611, 6185, 7365, ☼6		Eŭropo, Azio, Afriko
<b>Ĵaŭde (5)</b>				
00:15-00:25*	Sarajevo	7105, 612		Eŭropo
22:15-22:30*	Tallinn	1035, 5925		Eŭropo, NordEŭropo
<b>Sabato (7)</b>				
07:30-08:00*¼	Vilnius	9710		Eŭropo
20:00-20:20*	RAI	9670, 11905		Eŭropo

Sume, ĉiusemajne ĉirkaŭ 31:00 da elsendoj.

☼Satelitnomo	pozicio	frek. kaj pol. (+TV-kanalo)	aŭda subportanto
1 Eutelsat II F6	13°E	11.476 GHz Hpol (TVPolonia)	7.38 MHz ( <i>Hot Bird</i> )
2 Astra	19.2°E	11.538 GHz Vpol (VH1)	7.38 MHz ‡
3 Astra	19.2°E	11.141 GHz Hpol (BFS 3)	8.10 MHz (ADR)
4 Eutelsat II F1	13°E	10.987 GHz Vpol (NBC)	7.38 MHz (Eŭropo)
5 Intelsat 603	34.5°W	4097.75 MHz LHCP	A-1 (Atl., Amerikoj)
6 Intelsat 704	66°E	4152.45 MHz RHCP	I-1 (Azio, Afriko)

Rimarko (\*): Programo kies horo estas konstanta laŭ *MezEŭropa Tempo*, kun t.n. "somera elektro-ŝpara horo": dum printempo kaj somero, MET=UTC+2:00.

Rimarko (†): La dimanĉa elsendo de R. Vatikana okazas ankaŭ dum katolikaj festtagoj, samhore.

Rimarko (‡): World Radio Network 1 Europe, 4 minuta realsendo de la posttagmeza programo de Pola Radio; disaŭdigita tra multaj urbaj kablo-retoj).

Rimarko (¼): Lasta sabato de ĉiu monato.

**AERA, Amikaro de Esperanto en Radio** celas kunigi la fortojn kaj helpemon de esperantlingvaj radio-aŭskultantoj, serve al tiu grava kultura rimedo: RADIO.

AERA funkciigos plurajn servojn:

- 1) eldonado de konstante ĝisdatigitaj informiloj pri frekvencoj, horaroj, adresoj kaj priskriboj de radio-stacioj kaj programoj (senditaj al membroj de AERA, al gazetoj kaj radio-stacioj);
- 2) diskonigo de la eblecoj, intereso kaj graveco de radio-aŭskultado kaj instigo al artikolado pri radio en gazetoj (ekz. per premio por verkinto);
- 3) helpo al esperantistaj organizaĵoj uzi la informoservon de radio;
- 4) helpo al radio-stacioj kaj instigo al radio-redaktoroj kunlabori.

Por plenumi ĉi tiujn servojn bezonatas: sekretariaj kaj eldonadaj elspezoj (kiujn pagos la kotizoj) kaj helpemaj kunlaborantoj (por informi pri siaj spertoj kiel aŭskultanto; zorgi pri dissendo de la informiloj; rilati kun stacioj, gazetoj, ktp.)

Informojn ĉe Bruno MASALA ✉ 2 rue des Vignes, F-57530 COINCY ☎ 0033 87 32 03 00 📧 <bmasala@woldnet.net>. □



# Portugalaj ♥ Letero Amikoj



*Saluton! Jen denove pluraj adresoj de alilandaj esperantistoj kun kiuj eble vi povos ekkorespondi. Provu! Interesaj amikoj en foraj landoj estas tre valora trezoro kaj esperanto estas unuka maniero trovi ilin. Krome, se vi travivis interesan sperton per esperanta leteramikeco nepre rakontu ĝin al ni! Mi atendas viajn leterojn kaj ĝis tiam — bonan korespondadon!*

*Gina*

«Mi nur de kelkaj monatoj lernas esperanton kaj mi deziras korespondi kun portugalo. Mi konas iomete vian landon kaj ĝi de ĉiam ravigas min.»

☺ **Vulcano RUGGERO**

✉ via Comunetto 3  
IT-30031 DOLO  
ITALIA

«Saluton! Mi troviĝas en ekonomia mal-facilaĵo kaj mi deziras trovi klientojn aŭ partnerojn en turismnegoco.»

☺ **Tatjana KOVALČUK**

✉ ul. Vigovskogo 7-45  
UA-290022 LVIV  
UCRANIA

«Mi estas 36-jara rena nesufiĉulo kaj serĉas korespondantojn en diversaj landoj kun sama problemo. Mi estas ankaŭ diplomita fotisto kaj instruas gitaran improvizadon.»

☺ **Bernard SPEGGIORIN**

✉ 92 avenue de Montredon  
FR-13008 MARSEILLE  
FRANĈA

«Mi estas studento kaj multe ŝatas lingvojn. Nun mi lernas esperanton kaj la portugalan kaj mi ŝatus korespondi kun studentoj esperantistoj el Portugalio.»

☺ **Ben STEVENS**

✉ P. O. Box 154  
Mainsburg, PA 16932-0154  
ESTADOS UNIDOS  
☐ <bstevens@wheat.msfl.edu>

«Mi estas novulo je esperanto. Mi estis dufoje en Portugalio kaj multe interesiĝis. Mi volas korespondi kun portugala esperantisto kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.»

☺ **Zeev GRINFELD**

✉ P.O.Kesto 3016  
IL-38130 HADERA  
ISRAEL

«Mi estas 10-jara knabo. Min interesas historio kaj mi ludas pianon.»

☺ **Tomasz SOLAK**

✉ ul. Kołtari 19/7  
PL-45-064 OPOLE  
POLONIA

«Mi estas 17-jara studento. Mi studas esperanton de kvar monatoj kaj al mi tre plaĉus korespondi kun gejunuloj de Portugalio por trakti diversajn temojn kaj starigi solidajn bazojn de amikeco.»

☺ **Joel LÓPEZ Hernández**

✉ calle Vista Alegre #260  
% Luz Caballero y Juan Bruno Zayas  
10 de Octubre, La Vibora, La Havana  
CUBA

«Saluton! Mi estas viro kun 22 jaroj kaj mi deziras korespondi kun geamikoj en ĉiuj landojn. Multajn Dankojn!!!»

☺ **Govind ACHARYA**

✉ 316, Pennsylvania Avenue #2  
San Diego, CA 92103-4135  
ESTADOS UNIDOS  
☐ <gacharya@weber.ucsd.edu>

# Vinilkosmo-kompil' 2: Ne nur Rok'!

La plej lasta titolo el la esperanta modernmuzika eldonejo VinilKosmo konsistas ne nur el roko...

VinilKosmo-Kompil' vol.2 estas, kiel sia antaŭulo vol.1, kolektaĵo de plej variaj esper-

antaĵkantoj kaj muzikaĵoj, havebla en kaseda aŭ kompaktdiska formato. VKK2 prezentas 19 pecojn el 19 kantistoj aŭ bandoj, el



10 diversaj landoj — stile disaj inter la rub-punka roko de "Korespondi deziras" (Piĉismo, Ukrainio) kaj la bosanova balado "Mia bon' mia malbon'" (Luanda CO-ZETTI, Brazilio), esperanta versio de samtitola kanto de Caetano VELOSO. Laŭ multaj eĉ pli bona ol VKK1, ĉi disko meritigas certe aĉeton ankaŭ pro sia malalta prezo: 4200\$00 (CD) aŭ 2500 \$00 (K7), por teknike perfekta, arte ĝuinda kaj informcele nepre aldoni al via kolekto! Aĉetu ĉe nia Libro-servo kaj petu kompletan katalogon rekte de VinilKosmo — Eŭrokka, Esperanto-Rok-Asocio, ✉ FR-31450 DON-NEVILLE, ☎ 0033 5 61 81 95 65. AM

**Directora: Olga ALMEIDA**

**Redactor: António MARTINS**

**Propriedade de Associação Portuguesa de Esperanto  
Pessoa Colectiva nº 501 547 312**

**Redacção, Administração, Composição e Impressão:**

**Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 LISBOA**

**Registo nº 110 966 — Depósito legal nº 21 871/88**